

PLEJ PROFUNDA FUNEBRADO PRI LA GRANDA GVIDANTO KAJ INSTRUISTO PREZIDANTO MAŬ ZEDONG



EL POPOLA

ĈINIO

11-12
1976

中國新道

ETERNAN GLORON


AL LA GRANDA

GVIDANTO KAJ

INSTRUISTO

PREZIDANTO

MAŬ ZEDONG!



Granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong

**NI FUNEBRAS KUN PLEJ GRANDA
LA GRANDA GVIDANTO KAJ INSTR**

Mesaĝo al la la Tuta Armeo kaj Naciecoj de

Fare de la Centra Komitato de
la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popol
la Ŝtata Konsilantaro de la
la Milita Komisiono de la Centra

La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio proklamas kun ekstreme profunda mal-

**MALĜOJO PRO LA FORPASO DE
JUSTO PREZIDANTO MAŬ ZEDONG**

Tuta Partio, la Popolo de Ĉiuj la Tuta Lando

la Komunista Partio de Ĉinio,
Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko,
Ĉina Popola Respubliko kaj
Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

ĝojo al la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando: Kamarado Maŭ Zedong, la estimata kaj amata granda gvidanto de nia partio, nia armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando, la granda instruisto de la internacia proletaro kaj la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj, prezidi-

danto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj honora prezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, forpasis je nulo horo kaj dek minutoj de la 9-a de septembro, 1976 en Pekino pro malsano, kiu graviĝis malgraŭ ĉiamaniera kaj zorgema kuracado.

Prezidanto Maŭ Zedong estas la fondinto kaj saĝa gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la Ĉina Popola Respubliko. Prezidanto Maŭ gvidis nian partion en longdaŭra, akra kaj komplika batalo kontraŭ la dekstra kaj “maldekstra” oportunismaj linioj en la Partio, en frakaso de la oportunismaj linioj antaŭenpuŝitaj de Ĉen Duĥiu, Kju Kiubaj, Li Lisan, Luo Ĝanglong, Vang Ming, Ĝang Guotaŭ, Gaŭ Gang kaj Ĵaŭ Ŝuŝi, kaj Peng Dehuaĵ, kaj en frakaso de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ en la Granda Proleta Kultura Revolucio, tiel ke nia partio senĉese disvolviĝis kaj fortiĝis en klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la Komunista Partio de Ĉinio trapasis zigzagan vojon kaj disvolviĝis en grandan, gloran kaj ĝustan marksisman-leninisman partion, kiu hodiaŭ gvidas la Ĉinan Popolan Respublikon.

Dum la periodo de la nov-demokratia revolucio, laŭ la universala vero de Marksismo-Leninismo kaj kombinante ĝin kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio, Prezidanto Maŭ kreive difinis la ĝeneralan linion kaj ĝeneralan politikon de la nov-demokratia revolucio, fondis la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon kaj montris, ke la kapto de ŝtatpotenco per armita forto en Ĉinio povas esti realigita nur tra la vojo de starigo de kamparaj bazlokoj, sieĝo de la urboj per la kamparo kaj finfina kapto de la urboj, sed ne tra iu alia vojo. Sub lia gvido nia partio, nia armeo kaj nia popolo renversis per popola milito la reakcian regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, akiris la grandan venkon de la nov-demokratia revolucio kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon. La venko de la revolucio de la ĉina popolo gvidita de Prezidanto Maŭ ŝanĝis la situacion en la Oriento kaj la mondo kaj malfermis novan vojon por la liberiga afero de la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj.

En la periodo de la socialisma revolucio, Prezidanto Maŭ komplete resumis la pozitivan kaj negativan sperton de la internacia komunisma movado, penetrive

analizis la klasajn rilatojn en socialisma socio, unuafoje en la historio de la disvolviĝo de Marksismo klare montris, ke ankoraŭ ekzistas klasoj kaj klasbatalo post la fundamenta plenumo de la socialisma transformado de posedanteco de produktaj rimedoj, faris la sciencan konkludon, ke la burĝaro ĝuste estas interne de la komunista partio, elmetis la grandan teorion de daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj ellaboris la fundamentan linion de la Partio en la tuta socialisma historia periodo. Direktate de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, nia partio, nia armeo kaj la popolo de nia lando marŝas antaŭen en venko kaj akiris grandajn venkojn de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, precipe grandajn venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. La persistado en socialismo kaj firmigo de la diktaturo de la proletaro en la Ĉina Popola Respubliko, lando kun vasta teritorio kaj multnombra loĝantaro, estas granda kontribuo kun monda historia signifo fare de Prezidanto Maŭ Zedong por la nuna epoko kaj samtempe liveris freŝan sperton por la internacia komunisma movado en opono kontraŭ kaj prevento de reviziismo, firmigo de la diktaturo de la proletaro, prevento de kapitalisma restaŭro kaj konstruo de socialismo.

Ĉiuj venkoj de la ĉina popolo estas akiritaj sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj estas grandaj venkoj de Maŭzedongpenso. La brilo de Maŭzedongpenso prilumos eterne por la ĉina popolo la vojon de antaŭenmarŝado.

Prezidanto Maŭ Zedong resumis la revolucian praktikadon en la internacia komunisma movado, elmetis serion da sciencaj tezoj, riĉigis la teorian trezorejon de Marksismo kaj montris la direkton de batalo por la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo. Kun la granda braveco de proleta revoluciisto, li iniciatis en la internacia komunisma movado la grandan batalon de kritiko kontraŭ moderna reviziismo kun la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la centro, plivigligis la disvolviĝon de la afero de la monda proleta revolucio kaj la batalo de la popoloj de ĉiuj landoj kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo kaj antaŭen puŝis la historion de la homaro.

Prezidanto Maŭ Zedong estas la plej granda marksisto de la nuna epoko. En la pasinta pli ol duono da jarcento, laŭ la principo de kombino de la universala vero de Marksismo-Leninismo kun la konkreta revolucia praktiko, li heredis,

defendis kaj disvolvis Marksismon-Leninismon en la longdaŭra batalado kontraŭ klasaj malamikoj en- kaj ekster-landaj, kaj en- kaj ekster-partiaj, kaj skribis ekstreme brilan ĉapitron en la historio de la proleta revolucia movado. Li dediĉis sian tutan energion, sian tutan vivon al la liberiga afero de la ĉina popolo, al la liberiga afero de la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo kaj al la afero de komunismo. Kun granda persistemo de proleta revoluciisto, li faris obstinan batalon kontraŭ sia malsano, dum la tempo de malsano daŭre gvidis la laboron de la tuta partio, la tuta armeo kaj la tuta lando kaj batalis ĝis la lasta spiro. La grandiozaj kontribuoj faritaj de li al la ĉina popolo, la internacia proletaro kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo estas senmortaj. Li akiris koran amon kaj senliman respekton de la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

La forpaso de Prezidanto Maŭ Zedong estas netaksebla perdo por nia partio, nia armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando, por la internacia proletaro kaj la revoluciaj popoloj de ĉiuj landoj kaj por la internacia komunisma movado. Lia forpaso certe vekos plej grandan malĝojon en la koro de la popolo de nia lando kaj la revoluciaj popoloj de ĉiuj landoj. La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio alvokas la tutan partion, la tutan armeon kaj la popolon de ĉiuj naciecoj de la tuta lando nepre turni la malĝojon en forton:

Ni nepre devas daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj persisti en preno de la klasbatalo kiel la ĉefĉenero, persisti en la fundamenta linio de la Partio kaj persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro.

Ni nepre devas daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj plifortigi la unuecan gvidon de la Partio, rezolute protekti la solidarecon kaj unuecon de la Partio kaj kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio. Ni devas fortigi la ideologian kaj organizan konstruadon de la Partio en la batalo inter la du linioj kaj rezolute praktiki la principon de triflanka kombiniĝo de maljunaj, mezaĝaj kaj junaj kadroj laŭ la kvin kondiĉoj por kulturaj daŭrigantojn de la proleta revolucia afero.

Ni nepre devas daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj firmigi la grandan unuiĝon de la popolo de ĉiuj naciecoj gvidatan de la laborista klaso kaj bazitan sur la alianco de laboristoj kaj kamparanoj, firmigi kaj disvolvi la fruk-

tojn de la venkoj de la Granda Proleta Kultura Revolucio, entuziasme subteni la novajn socialismajn aferojn, limigi burĝajn rajtojn kaj pluapase firmigi la diktaturon de la proletaro en nia lando. Ni devas daŭre disvolvi la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, kaj konstrui socialismon sendepende kaj memdecide, diligente kaj ŝpareme, nin apogante sur propraj fortoj, peneme luktante kontraŭ malfaciloj, streĉante plene la energion kaj strebante forte antaŭen, laŭ la principo “multe, rapide, bone kaj ekonomie”.

Ni nepre devas daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj rezolute praktiki la armeo-konstruan linion de Prezidanto Maŭ, fortigi la konstruadon de la armeo, fortigi la konstruadon de la milicio, fortigi la preparon kontraŭ milito, altigi la singardemon kaj esti pretaj ĉiumomente por ekstermi ĉiujn malamikojn, kiuj aŭdacos nin invadi. Ni nepre liberigos Tajvan.

Ni nepre devas daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj rezolute efektiviĝi kaj plenumi plue la revoluciajn diplomaciajn linion kaj politikojn de Prezidanto Maŭ. Ni devas persisti en la proleta internaciismo, fortigi la unuiĝon de nia partio kun la veraj marksismaj-leninismaj partioj kaj organizoj de la tuta mondo, fortigi la unuiĝon de la popolo de nia lando kun la popoloj de ĉiuj aliaj landoj, precipe kun tiuj de la landoj de la tria mondo, unuiĝi kun ĉiuj unuigeblaj fortoj en la mondo kaj konduki ĝis la fino la batalon kontraŭ imperiismo, social-imperiismo kaj moderna reviziismo. Ni neniam ĉasos hegemonion kaj nia lando neniam klopodos por esti superpotenco.


Ni nepre devas daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj pene studi Marksismon-Leninismom-Maŭzedongpensom, diligente studi verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ kaj batali por komplete renversi la burĝaron kaj ĉiujn aliajn ekspluatantajn klasojn, anstataŭigi la diktaturon de la burĝaro per la diktaturo de la proletaro, venki kapitalismon per socialismo, konstrui nian landon en potencan socialisman landon, fari kompare grandan kontribuon al la homaro kaj finfine realigi komunismon.

Vivu la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!

Eternan gloron al la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong!





La restaĵoj de la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ



Kun senlimaj estimo kaj amo al Prezidanto Maŭ, partiaj kaj ŝtataj gvidantoj Hua Guofeng, Je Giangjing, Song Kingling, Li Hiannian, Ĉen Hilian, Gi Dengkuj, Vang Dongning, Vu De,





Hju Sijoŭ, Vej Guoking, Li Deŝeng, Ĉen Jonggŭj, Vu Gujhan, Su Ĝenhua, Ni Ĝifu kaj Sajfudin esprimas respekton al la restaĵoj de Prezidanto Maŭ.


Laboristoj de Pekino solene faras ĵuron antaŭ la restaĵoj de Prezidanto Maŭ.



Malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de la ĉirkaŭurbo de Pekino funebras pri Prezidanto Maŭ.



Reprezentantoj de la komandantoj kaj soldatoj de la tera, mara kaj aera armeoj de ĈPLA solene ĵuras.



Diverslandaj geamikoj, diplomatoj, studentoj kaj praktikantaj lernantoj en Pekino venas al la Popola Halo kune kun diverslandaj amasoj de nia ĉefurbo por funebri pri la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ kaj esprimi respekton al liaj restaĵoj.



Pekinaj ruĝgardianetoj funebras pri Prezidanto Maŭ.

Reprezentantoj de nacimalplimultoĵ funebras pri Prezidanto Maŭ.



Funebra soleno en respekton al la restaĵoj

La forpaso de Prezidanto Maŭ Zedong, la estimata kaj amata granda gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de Ĉinio, kaj la granda instruisto de la internacia proletaro kaj la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj, vekis grandegan malĝojon en la koro de la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

De la 11-a ĝis la 17-a de septembro, kun senkompare profunda proleta sentimento niaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj kaj pli ol 300,000 kadroj de la partiaj, registaraj kaj armeaj institucioj, laboristoj, kamparanoj, soldatoj, diversrondaj popolanoj, kaj diverslokaj reprezentantoj en Pekino venis en la majestan Popolan Halon por funebri pri la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ, esprimi respekton al liaj restaĵoj, esprimi senlimajn estimon kaj amon de la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando kaj esprimi ilian firman decidon daŭrigi la de li postlasitan aferon kaj konduki la aferon de la proleta revolucio ĝis la fino.

En la funebrado kaj gardado de la restaĵoj de Prezidanto Maŭ partoprenis la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj Hua Guofeng, Je Jianjing, Li Hian-nian kaj aliaj gekamaradoj.

En la Popola Halo regis soleneco. Super la enirejo de la funebra halo pendis transversa rubandego kun la surskribo: "Daŭrigu la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj konduku la aferon de la proleta revolucio ĝis la fino!" La muroj de la halo estis dekoraciitaj per nigraj toloj. Meze de la funda muro de la halo pendis giganta portreto de Prezidanto Maŭ kaj sube estis vicoj da pinoj, cipresoj kaj aliaj ĉiamverdaj

plantoj. La restaĵoj de Prezidanto Maŭ kuŝis en ĉiamverdaj arbustoj kaj estis kovritaj per la flago de la Komunista Partio de Ĉinio. Soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kun pafiloj enmane gardostaris ambaŭflanke.

La funebra halo estis plenigita de florkronoj. Inter ili estis florkronoj prezentitaj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio; de la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj.

Dum la funebra soleno de sep tagoj, la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj Hua Guofeng, Je Jianjing, Li Hiannian kaj aliaj laŭvice gardostaris ambaŭflanke de la restaĵoj de Prezidanto Maŭ, kaj ili faris kolektive la funebradon kaj gardostaradon ĉe la restaĵoj de Prezidanto Maŭ antaŭ la komenco de la funebra ceremonio en la 11-a de septembro kaj je ĝia finiĝo en la 17-a.

Dum tiuj sep tagoj, de tagiĝo ĝis profunda nokto, laboristoj, kamparanoj, komandantoj kaj soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, amasoj de diversaj naciecoj kaj diversaj rondoj, kadroj de la partiaj, registaraj kaj armeaj institucioj de Pekino kaj reprezentantoj venintaj el diversaj lokoj de la tuta lando, funebre vestitaj kun nigra rubando ĉirkaŭ la brako, iris per pezaj paŝoj en la funebra muziko, grupon post grupo en la funebtran halon. Ili staris respektoplene en silenta funebro antaŭ la restaĵoj de Prezidanto Maŭ. Kiam ili iris malrapide preter la restaĵoj de la estimata kaj amata gvidanto por esprimi respekton al li, ili ne plu povis deteni sin de plorego pro la grandega malĝojo.

Inter ili troviĝis maljunaj ruĝgardianoj, kiuj siatempe persistis en batalado sur Gingsangmontaro sub la gvido de Prezidanto Maŭ, veteranaĵoj ruĝarmeanoj, kiuj faris la mondfaman

Pekino por esprimi

de Prezidanto Maŭ

Longan Marŝon de 25,000 Lioj sekvante Prezidanton Maŭ, veteranaj batalantoj de la Okavoja Armeo, kiuj faris sangan bataladon kontraŭ la japanaj agresantoj, veteranaj soldatoj, kiuj bataladis norde kaj sude de la lando dum la Popola Liberiga Milito, junaj ruĝgvardianoj, kiuj brave sturmis en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj estis feliĉe aŭdiencitaj de Prezidanto Maŭ. Rememorante la brilan bataladon de la ĉina revolucio kaj la venkan disvolviĝon de la monda revolucia batalo, ili ankoraŭ pli bone sentis la senkomparan brilecon kaj grandecon de Prezidanto Maŭ, kaj ili neniel povis plene esprimi per vortoj siajn senliman amon al kaj senfinan karmemoron pri Prezidanto Maŭ.

Centoj da milionoj da popolanoj sentas senliman malĝojon pro la perdo de sia plej estimata kaj amata granda gvidanto. Sed en tiu ĉi malĝojega tempo, la ĉina popolo nutrita de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, hardita en la Granda Proleta Kultura Revolucio, sin montris tre firma. Laboristaj reprezentantoj el la Pekina Ĝenerala Fabriko de Triakoj, la Pekina Hinhua-presejo, la Tria Kemia Fabriko de Pekino, la Ligna Fabriko de la Norda Antaŭurbo de Pekino, la Pekina Fabriko de Lokomotivoj kaj Vagonoj "La Sepa de Februaro" kaj la Nankoŭ-a Fabriko de Lokomotivaj Maŝinoj de Pekino venis en bonordaj vicoj en la funebran halon per pezaj paŝoj. Dum sia vivtempo Prezidanto Maŭ multe zorgis pri la revolucio kaj produktado de tiuj ses fabrikoj. En la kultura revolucio, Prezidanto Maŭ sendis al ili armeanojn de 8341-trupo de ĈPLA por subteni la maldekstrulojn kaj plurfoje intime akceptis reprezentantojn de iliaj laboristoj. Estas la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kiu direktas ilin en daŭrigado de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Prezidanto

Maŭ ligiĝis kun la laboristoj koro kun koro. La laboristoj de la ses fabrikoj solene ĵuris kun larmoj antaŭ la restaĵoj de Prezidanto Maŭ: La laboristaro de la ĉefurbo certe turnos sian malĝojegon en forton, rezolute plenumos la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, disvolvos la movadon de lerno de Ĝaking en industrio kaj daŭrigos la proletan revolucion aferon komencitan de Prezidanto Maŭ ĝis la fino.

Reprezentantoj de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Pinggu, la avangarda gubernio en lerno de Daĝaj en agrikulturo, venis en la Popolan Halon por funebri pri Prezidanto Maŭ kaj esprimi respekton al liaj restaĵoj. Ili diris: "Prezidanto Maŭ tenis la laborantan popolon de la mondo en sia koro, li ligiĝis kun ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj koro kun koro. Se ne estus Prezidanto Maŭ, ne povus esti la feliĉa hodiaŭo de ni." Starante en vicoj ili ĵuris antaŭ la restaĵoj de Prezidanto Maŭ, ke ili firme decidis daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, ankoraŭ pli alte teni la ruĝan flagon de Daĝaj starigitan de li, persistadi en preno de la klasbatalo kiel la ĉefĉenero, teni la revolucion, stimuli la produktadon, klopodi por akiri novajn venkojn de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj funebri pri Prezidanto Maŭ per siaj agoj.

Reprezentantoj de soldatoj kaj kadroj de la teraj, maraj kaj aeraj fortoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo venis en kolonoj en la halon por funebri kun dolora koro pri la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ. Estis Prezidanto Maŭ, kiu kreis la grandan popolan armeon, kaj estis Prezidanto Maŭ, kiu direktadis la armeon bataladi en nordo kaj sudo kaj fondis la socialisman ruĝan ŝtaton. La batalantoj de Prezidanto Maŭ por ĉiam karmemoros sian saĝan ĉefkomandan-



ton. Ili solene ĵuris, ke ili nepre firme unuiĝos ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio, rezolute plenumos la armekonstruan linion de Prezidanto Maŭ, pliintensigos la konstruadon de la armeo, pliakrigos sian singardemon, plifortigos la preparadon kontraŭ milito, estos ĉiam pretaj por ekstermi ĉiujn malamikojn, kiuj aŭdacos invadi nian landon, mortospite defendos la Centran Komitaton de la Partio kaj la grandan socialisman patrolandon, kaj nepre liberigos Tajvan.

Kiam la reprezentantoj de nacimalplimultaj popolanoj laborantaj aŭ lernantaj en la ĉefurbo venis esprimi respekton al la restaĵoj de Prezidanto Maŭ, ili sentis ekstremam malĝojon. En malsamaj naciaj lingvoj ili diris: Estis Prezidanto Maŭ kiu gvidis nin en renverso de la tri montegoj sur niaj kapoj nome imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, en rompo de la miljara kateno de klasa subpremo kaj nacia subpremo de la malnova socio kaj turnis nin sklavojn

Laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj diversondaj popolanoj de nia ĉefurbo venas al la majesta Popola Halo por funebri pri la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ kaj esprimi respekton al liaj restaĵoj.





Reprezentantoj de diversrondaj popolamasoj plenumas silentan funebbron antaŭ la restaĵoj de Prezidanto Maŭ.

en mastrojn de la nova Ĉinio; estis Prezidanto Maŭ kiu savis nin nacimalplimultojn el la pere kaj kondukis nin sur la vojon de prospera disvolviĝado kaj starigis nin inter la progresintajn naciojn. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ estis la granda savanto de la popolo de ĉiuj naciecoj de Ĉinio; se ne estus Prezidanto Maŭ, ne povus esti la feliĉa hodiaŭo de niaj pli ol 50 nacimalplimultoj. Ni nepre diligente studos Marksismon-Leninismom-Maŭzedongpensom, kompakte

unuigis ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio, rezolute plenumos la proletan revolucion linion de Prezidanto Maŭ, plifortigos la unuigon de la naciecoj kaj klopodos por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn en la socialismaj revolucio kaj konstruado.

Maŭ Dikiu, sekretario de la partia filio de Ŝaŭŝan-brigado de Hunan-provinco, reprezentanto el la hejmloko de Prezidanto Maŭ, diris



plorante: “Prezidanto Maŭ tre zorgis pri ni popolanoj de Ŝaŭŝan, montris al ni la direkton en ĉiu revolucia stadio kaj kuraĝigis nin marŝi antaŭen en venko. Ni nepre konstruos Ŝaŭŝan ankoraŭ pli bela, ankoraŭ pli bone protektos kaj administros la malnovan domon de Prezidanto Maŭ kaj la ekspoziciejon pri ĝi, ke ili fariĝu klasĉambroj por propagandi Marksismen-Leninismen-Maŭzedongpenson kaj fari edukon al la popolo pri la revolucia tradicio.”

Ekde la 13-a de septembro, ankaŭ diverslandaj gcamikoj kaj diplomatoj en Pekino venis unuj sekvante aliajn al la Popola Halo por funebri kun kora malĝojo pri Prezidanto Maŭ kaj esprimi respekton al la restaĵoj de Prezidanto Maŭ. La partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de Ĉinio akceptis respektive en la funebra halo la diverslandajn gastojn kaj esprimis korajn dankojn al ili pro ilia funebro pri nia granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ.

Ŝtataj gvidantoj, registaroj kaj popolanoj de multaj landoj de la kvin kontinentoj alsendis florkronojn por esprimi sian profundan funebbron pri Prezidanto Maŭ.

La florkrono prezentita de Prezidanto Kim Il Sen, la granda gvidanto de la korea popolo, farita el freŝaj floroj, kiuj kreskis sur la tero de Koreio, surhavis jenan surskribon: “Funebro pri la forpasinta Kamarado Maŭ Zedong”. Prezidanto Kim Il Sen sendis la florkronon per speciala aviadilo sub la eskorto de Ĉon Mjong Su, vicministro de eksteraj aferoj. Kiam Vicministro Ĉon Mjong Su venis en la Popolan Halon por funebri pri Prezidanto Maŭ, li diris al Ĉefministro Hua Guofeng: “Kamarado Kim Il Sen, la granda gvidanto de la korea popolo, petis min komuniki lian grandegan malĝojon pro la forpaso de Kamarado Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo, granda proleta revoluciisto, unu el la eminentaj gvidantoj de la internacia komunisma movado kaj laborista movado kaj la plej intima kunbatalanto de la korea popolo, kaj la profundan malĝojon de la Korea Labora Partio, la registaro kaj la popolo de Koreio.”

La florkrono prezentita de Kamarado Enver Hoxha, la granda gvidanto de la albana popolo, portis funebbran rubandon kun jena surskribo: “Al Kamarado Maŭ Zedong, la granda gvidanto, marksisto-leninisto, revolucia strategiisto kaj la plej kara amiko de la albana popolo!” Ankaŭ la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro, la Prezidantaro de la Popola Parlamento kaj la Konsilio de Ministroj de Albanio prezentis florkronojn.

La florkrono prezentita de Kamarado Nicolae Ceausescu, ĝenerala sekretario de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Socialisma Respubliko de Rumanio, portis funebbran rubandon kun la surskribo: “En profunda memoro pri Prezidanto Maŭ Zedong”. Ankaŭ la Centra Komitato de la Rumana Komunista Partio, la Ŝtata Konsilantaro kaj registaro de la Socialisma Respubliko de Rumanio prezentis respektive florkronon.

La florkrono prezentita de la Centra Komitato de la Vjetnama Laborulara Partio, la Konstanta Komitato de la Nacia Asembleo kaj la Registara Konsilantaro de la Socialisma Respubliko de Vjetnamio portis funebbran rubandon kun jena surskribo: “Al Prezidanto Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo kaj la estimata kaj amata amiko de la vjetnama popolo”. La florkrono estis farita en la urbo portanta la nomon de Ho Chi Minh, la granda gvidanto de la vjetnama popolo, kaj alsendita per speciala aviadilo al Pekino.

Sur revena vojo al sia patrolando, Ieng Sary, vicĉefministro de la registaro de la Demokratia Kamboĝo, alvenis kun siaj kamaradoj al Pekino je la 17-a de septembro kaj tuj venis en la Popolan Halon por funebri, esprimi respekton al la restaĵoj de Prezidanto Maŭ kaj prezenti florkronon. Kun larmoj en la okuloj Vicĉefministro Ieng Sary staris respektoplene antaŭ la restaĵoj de Prezidanto Maŭ en silenta funebro kaj longe fiksrigardis la vizaĝon de Prezidanto Maŭ. Li diris al Vicĉefministro Gi Dengkuj: “La brila penso de Prezidanto Maŭ estas ne nur granda por la ĉina popolo sed ankaŭ senmorta por la tutmonda popolo, precipe por la kamboĝa popolo. Ni estas ege malĝojaj pro la forpaso de Prezidanto Maŭ, sed ni nepre turnos

la malĝojn en forton kaj kondukos la revolucion ĝis la fino.”

Ankaŭ Sithon Cibounheuanz, provizora aferŝarĝito de la ambasado de Laoso en Ĉinio, venis por funebro kaj prezentis florkronon.

La kamaradoj de fremdlandaj marksismaj-leninismaj partioj kaj organizaĵoj kaj diverslandaj specialistoj helpantaj la ĉinan popolon en ĝia socialisma konstruado en Pekino venis, kun profunda proleta sentimento, al la Popola Halo por malĝojege funebri pri Prezidanto Maŭ kaj esprimi respekton al liaj restaĵoj, kaj prezentis florkronojn. Ĉinaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj respektive akceptis en la funebra halo la funebrajn diverslandajn gekamaradojn kaj geamikojn kaj esprimis al ili profundajn dankojn.

Kamarado Thakin Ba Thein Tin, prezidanto de la Centra Komitato de la Birma Komunista Partio, kiu partoprenis en la funebra ceremonio, diris al Kamarado Hua Guofeng: “En tiu ĉi malĝoja momento pro la forpaso de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la ĉina popolo kaj granda instruisto de la internacia proletaro, ni birmaj komunistoj decidis firme unuiĝi kun la ĉinaj komunistoj. Ni estas profunde konvinkitaj, ke la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio certe plue plenumos la revolucionan linion de Prezidanto Maŭ. Niaj du partioj plue unuiĝu kaj kune batalu kiel en la tempo kiam Prezidanto Maŭ vivis inter ni.”

Kamarado Jusuf Adjitorop, estro de la Delegacio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Indonezio kaj membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Indonezio, skribis en la kondolencia libro: “La forpaso de Kamarado Maŭ Zedong estas giganta perdo por la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo kaj por la komunistoj kaj revolucia popolo de la tuta mondo, inkluzive de la komunistoj kaj la revolucia popolo de Indonezio. Ni indoneziaj komunistoj decidis ĉiam resti fidelaj al la doktrino de Kamarado Maŭ Zedong, la plej granda marksisto de la nuna epoko, unuiĝi kaj batali tutkore dum la tuta vivo por la liberigo de la indonezia popolo kaj por la nobla idealo de komunismo. Kamarado Maŭ Zedong vivos eterne en nia koro.”

Ankaŭ fremdlandaj studentoj, praktikantaj lernantoj, ĵurnalistoj kaj geamikoj de aliaj sferoj en Pekino venis por funebrado.

En la funebra ceremonio partoprenis ankaŭ membroj kaj alternaj membroj de la Centra Komitato de KPC, membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco; respondeculoj de la departementoj de CK de KPC kaj de la registaro, la ĝeneralaj departementoj de ĈPLA, la ĉefkomandejoj de diversaj armeoj kaj armilaroj, la Scienca kaj Teknika Komisiono de Nacidefendo, la militaj kolegioj kaj lernejoj, la Pekinaj Trupoj, la Pekina Komitato de KPC, la Pekina Revolucia Komitato kaj la Pekina Garnizona Regiono; reprezentantoj de la malnovaj revoluciaj bazlokoj, reprezentantoj de la avangardaj unuoj kiel Daking, Daĝaj kaj Bona Oka Kompanio ĉe Nankinstrato, reprezentantoj de diversrondaj amasoj; patriotaj demokratoj, tajvan-aj samlandanoj kaj ĉinaj elmigrintoj kaj hongkong-aj kaj aŭmen-aj samlandanoj en Pekino.

Ekde la 9-a de septembro, la tuta Ĉinio dronis en profunda malĝojejo. La partiaj komitatoj kaj revoluciaj komitatoj de la 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj la partiaj komitatoj de la ĈPLA-aj trupoj de Pekino, Ŝenjang, Ĝinan, Langŝou, Fuĝou, Nankino, Vuhan, Kantono, Ĉengdu, Kunming kaj Hingiang ĉiuj sendis respektive telegramon al la Centra Komitato de KPC, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, la Ŝtata Kensisilantaro kaj la Milita Komisiono de CK de KPC, por plej profunde funebri pri la estimata kaj amata granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ. Ankaŭ en la bazaj unuoj de la institucioj, trupoj, minejoj, fabrikoj, entreprenoj, magazenoj, popolaj komunumoj, lernejoj kaj loĝkvartaloj de la tuta lando faris funebrajn aktivadojn.

La funebra soleno en nia ĉefurbo kaj diversaj lokoj de la tuta lando vekis gigantan forton en la koro de la ĉina popolo. Ili decidis teni la revolucion, stimuli la produktadon, aliajn laborojn kaj la preparadon kontraŭ milito, kaj brave marŝi antaŭen laŭ la revolucia vojo malfermita de Prezidanto Maŭ, por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Pekino kaj aliaj lokoj solenajn fune por Prez

La forpaso de Prezidanto Maŭ Zedong, la granda gvidanto kore amata kaj senlime estimata de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de Ĉinio, la nuntempa plej granda marksisto kaj la granda instruisto de la internacia proletaro kaj la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj, vekis senliman malĝojon en la koro de la popolo de la tuta Ĉinio kaj la popoloj de la tuta mondo. En la 18-a de septembro, miliono da popolanoj de la ĉina ĉefurbo Pekino okazigis sur la grandioza Tian-anmen-placo ekstreme solenan funebran kunvenon. Radiodisaŭdigo kaj televido pri la kunveno estis samtempe farita al la tuta lando. La okcent milionoj da popolanoj sur la vasta lando dolore funebris pri Prezidanto Maŭ,

la fondinto kaj saĝa gvidanto de niaj granda partio, granda armeo kaj granda lando, kaj la granda savanto de la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando.

La afero, por kiu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ batalis dum la tuta vivo, ligiĝas kun la vasta popolamaso kiel sango kun karno. Li portis lumon al nia lando kaj feliĉon al la popolo de ĉiuj naciecoj kaj igis la multe suferintan ĉinan nacion stariĝi. Prezidanto Maŭ vivos por ĉiam en la koro de centoj da milionoj da popolanoj. La ĉiamvenka Maŭzedongpenso por eterne brilos. En tiu malĝojega momento, la okcent milionoj da popolanoj decidis turni sian malĝojon en forton, daŭrigi la aferon postlasitan de Pre-

de Ĉinio okazigis brajn kunvenojn gidanto Maŭ

gidanto Maŭ kaj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio, unuiĝi, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj konduki ĝisfine la aferon de la proleta revolucio komencitan de Prezidanto Maŭ.

La senprecedence granda funebra kunveno okazigita de nia ĉefurba popolo esprimis la koran amon kaj senkomparan estimon de la tutlanda popolo al la granda gidanto Prezidanto Maŭ. En la funebra kunveno partoprenis la partiaj kaj ŝtataj gidantoj Hua Guofeng, Je Giangjing, Li Hiannian kaj aliaj.

Sur Tian-anmen-placo regis solena silento. Sur la nigra rubando horizontale pendanta sur Tian-anmen-pordego estis jenaj blankaj ideografiaĵoj

“Funebra Kunveno por la Granda Gvidanto kaj Instruisto Prezidanto Maŭ Zedong”. La sepmetre alta portreto de la granda gidanto Prezidanto Maŭ pendis meze de la ruĝa fasado de la pordego. Soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kun fusilo en la mano solene staris ambaŭflanke de la portreto. Sur la ruĝa alta tribuno speciale konstruita por la funebra kunveno antaŭ la pordego viciĝis verdaj cipresoj kaj helflavaj aŭtunaj krizantemoj kaj staris florkronoj prezentitaj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la partiaj kaj ŝtataj gidantoj. Sur la ruĝaj altanoj orientaj kaj okcidentaj ambaŭflanke de la pordego la florkronoj de la partiaj, registaraj kaj armeaj departementoj kaj la 29 provincoj, municipoj kaj aŭto-

Gvidantoj de la Partio kaj la stato Hua Guofeng, Je Jianjing, Song Kingling, Li Hiannian, Cen Hilian, Gi Dengkuj, Vang Donghing, Vu De, Hju Sijoŭ, Vej Guoking, Li Deŝeng, Cen Jongguj, Vu Gujhian, Su Genhua, Ni Gifu kaj Sajfudin en la funebra kunveno





nomaj regionoj staris inter ĉiamverdaĵoj. Antaŭ la Monumento de la Popolaj Herooj sude de la placo alte staris giganta nigra rubando kun alvoka slogano: "Daŭrigu la aferon postlasitan

de Prezidanto Maŭ kaj konduku la aferon de la proleta revolucio ĝis la fino!"

En la centro de Tian-anmen-placo la nacia standardo estis duonmaste hisita en signo de


Popolanoj de nia ĉefurbo okazigas sur Tian-anmen-placo solenan Funebran Kunvenon por Prezidanto Maŭ Zedong.





funebro. La heroaj pekinaj popelanoj kaj kadroj de la partiaj, registaraj kaj armeaj institucioj venis tien el fabrikoj, minejoj, entreprenoj, magazenoj, antaŭurbaj popolkomunumoj, kazernoj,

institucioj, lernejoj kaj loĝkvartaloj kaj silente staris bonorde sur la tuta placo kaj la longaj Orienta kaj Okcidenta Ĉang-an-stratoj. La grandioza Tian-anmen-placo estas simbolo de la



nova Ĉinio kaj historia atesto ke la ĉina popolo stariĝis. Antaŭ 27 jaroj, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone hisis tie la unuan kvinstel-
 lan ruĝan flagon. En la pasintaj pli ol dudek jaroj, Prezidanto Maŭ tie revuis milionojn kaj milionojn da niaj heroaj popolanoj kaj armeanoj. Tie estis okazigita grandioza soleno por celebri la brilan venkon en la socialisma reformado, kaj estis okazigitaj grandskalaj amasaj mitingoj por subteni la tutmondajn subprematajn naciojn kaj subprematajn popolojn en ilia revolucia batalo. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, Prezidanto Maŭ en verda arma uniformo kaj kun ruĝa brakrubando persone revuis 13,000,000 ruĝgvardianojn venintajn el diversaj lokoj de la tuta lando, mobilizis kaj gvidis la tutlandan popolon en frakasado de la du burĝaj komandejoj de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ. La grandioza Tian-anmen-placo estas loko kiu registras la grandajn revoluciajn praktikojn de Prezidanto Maŭ post la Liberiĝo. La gigantaj kontribuoj de Prezidanto Maŭ brilas kiel la suno kaj la luno. Hodiaŭ, kiam forpasis la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la miliono da popo-
 lanoj kolektiĝis tie por esprimi sian profundan funebbron.

Ĝuste je la tria horo posttagmeze, malfermiĝis la funebra kunveno. La miliono da popolanoj sur la tuta placo staris en silenta funebro tri minutojn. La 500-persona arma orkestro ludis funebbran muzikon. Radiodisaŭdigo kaj televido pri la kunveno estis faritaj al la vastaj limregio-
 noj kaj ĉiuj anguloj de la tuta lando. La okcent milionoj da ĉinaj popolanoj kun larmoj solene staris por funebrado.

Samtempe kun tio, en la fabrikoj kaj minejoj de la tuta lando, en la galopantaj vagonaroj kaj

sur la var- kaj milit-ŝipoj sur riveroj kaj maroj laŭte sonis sirenoj en signo de funebro.

Kaj samtempe kun tio, antaŭ afinaciaj fornoj, apud elektraĵ motoroj, ĉe operaciaj stabloj kaj sur ĉiuj aliaj batalpostenoj kie oni ne povis interrompi sian laboron, oni funebriis pri la granda gvidanto Prezidanto Maŭ per sia diligenta laboro.

Malĝojis la okcent milionoj da popolanoj kaj funebriis la tuta lando. La tutlanda popolo sen-
 lime karmemoris Prezidanton Maŭ. Nia partio, nia lando kaj nia popolo ŝuldas ĉion hodiaŭan al la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ. Ĉiuj venkoj kaj atingoj kaj la feliĉo de la homoj suferintaj en la pasinteco kaj de la nova generacio kreskintaj sub la ruĝa flago, ilia konfido, espero kaj forto por venki ĉiujn malfacilojn, kaj ilia arda aspiro al komunismo — ĉio ĉi tio estas ligita kun la granda nomo de Prezidanto Maŭ Zedong kaj de-
 venis de la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. La gigantaj kontribuoj de Prezidanto Maŭ vivos eterne kaj brilos por ĉiam en la historio de la homaro.

Post la funebra silento plenumita de la okcent milionoj da popolanoj, la arma orkestro laŭte ludis sur Tian-anmen-placo la nacian himnon de la Ĉina Popola Respubliko kaj *La Internacion*

Ni grupiĝu en rond',

kaj la Internacio triumfu en tutmond'.

La imponaj kantoj kuraĝigas homojn al batalo. Prezidanto Maŭ por eterne vivos en la koro de diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando, kaj la brilo de Maŭzedongpenso por eterne prilumos la antaŭenmarŝan vojon por la centoj da milionoj da popolanoj de nia lando.

Kamarado Hua Guofeng, unua vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, faris funebran paroladon. (Vidu p. 8 en tiu ĉi numero.)

Post la parolado de Kamarado Hua Guofeng, la miliono da ĉeestantoj kaj la okcent milionoj da popolanoj en la tuta lando faris tri riverencojn antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ.

Poste eksonis super Tian-anmen-placo la grandioza melodio de *Ruĝas la Oriento*:

*Ruĝas la oriento,
Leviĝas la suno,
En Ĉinio aperis Maŭ Zedong;
Li laboras por feliĉigi la popolon,
Li estas granda savanto de la popolo.*

...

Tiu ĉi granda sublima himno kortuŝis la centojn da milionoj da popolanoj kaj vekis ĉe ili senliman karmemoron pri la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. La himno resonis super Pekino kaj super la vasta teritorio de nia granda patrolando. La centoj da milionoj da popolanoj de nia lando por eterne kantos la himnon generacion post generacio kaj ĉiam korklinos al Prezidanto Maŭ. Ili decidis brave marŝi antaŭen laŭ la revolucia vojo malfermita de Prezidanto Maŭ.

La funebra kunveno finiĝis je 30 minutoj post la 3-a horo.

Posttagmeze de la 18-a, aŭskultis la disaŭdigon pri la funebra kunveno okazigita en Pekino kaj sekve okazigis la saman kunvenon la popolanoj kaj ĈPLA-anoj de la urboj Ŝanhajo kaj Tiangin, la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj la

Hingiang-aj Trupoj, Gansu-provinco kaj la Lanĝou-aj Trupoj, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, Hejlonggiang-provinco, Gilin-provinco, Liaŭning-provinco kaj la Ŝenjang-aj Trupoj, Ŝandong-provinco kaj la Ginan-aj Trupoj, Fugian-provinco kaj la Fuĝou-aj Trupoj, Hunan-provinco, Guangdong-provinco kaj la Kantonaj Trupoj, la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono, Hebej-provinco, Ŝanhi-provinco, Ŝenhi-provinco, la Ninghia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, Giansu-provinco kaj la Nankinaj Trupoj, Ĝegiang-provinco, la Tibeta Aŭtonoma Regiono, Siĉuan-provinco kaj la Ĉengdu-aj Trupoj, Hubej-provinco kaj la Vuhan-aj Trupoj, Henan-provinco, Anhuj-provinco, Gianghi-provinco, Gujĝou-provinco, Junnan-provinco kaj la Kunming-aj Trupoj, kaj Kinghaj-provinco.

Tion faris ankaŭ la partiaj kaj registaraj institucioj de kaj super la gubernia nivelo en la tuta lando, la teraj, maraj kaj aeraj fortoj de ĈPLA en batalposteno, la komunistoj, membroj de la Komunisma Junulara Ligo, kadroj, laboristoj, kamparanoj, revoluciaj intelektuloj kaj popolamasoj de diversaj naciecoj en la fabrikoj, minejoj, entreprenoj, magazenoj, kamparaj komunumoj, lernejoj kaj loĝkvartaloj tra la tuta lando. En la kunvenoj la ĉefaj respondeculoj de diverslokalaj partiaj, registaraj kaj armeaj institucioj faris funebran paroladon por profunde funebri pri la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong. La popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando decidis turni la malĝojon en forton, kaj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio, persisti en la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, daŭre antaŭenmarŝi laŭ la socialisma vojo kaj unuiĝi por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn!

Funebra Parolado

Hua

Unua Vicprezidanto de la Komunista Partio de Ĉinio kaj en la Funebra Kunveno por la Prezidanto

Gekamaradoj kaj geamikoj,

Hodiaŭ, la reprezentantoj de la partiaj, registaraj kaj armeaj institucioj, laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj la amasoj de ĉiuj rondoj de la ĉefurbo okazigas sur Tian-anmen-placo solenan funebran kunvenon por, kune kun la popolanoj de ĉiuj naciecoj de la tuta lando, ekstreme dolore funebri pri Prezidanto Maŭ Zedong, nia estimata kaj amata granda gvidanto kaj la granda instruisto de la internacia proletaro kaj la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj.

De la lastaj tagoj, la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando sentas senliman malĝojon pro la forpaso de Prezidanto Maŭ Zedong. La afero, al kiu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ dediĉis sian tutan vivon, ligiĝas kun la vastaj popolamasoj, kiel sango kun karno. La ĉina popolo longe

suferinta de subpremado kaj ekspluatado liberiĝis kaj fariĝis mastro de la ŝtato ĝuste dank' al la gvido de Prezidanto Maŭ. La suferplena ĉina nacio stariĝis ĝuste dank' al la gvido de Prezidanto Maŭ. La ĉina popolo kore amas, konfidas kaj respektas Prezidanton Maŭ. La internacia proletaro kaj la progresema homaro profunde funebras pro la forpaso de Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ Zedong estas la fondinto kaj saĝa gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la Ĉina Popola Respubliko.

Prezidanto Maŭ hardis kaj kulturisman partion, gvidante ĝin en la batalo kontraŭ la klasaj malamikoj en- kaj eksterlandaj, kaj en- kaj eksterpartiaj kaj en la longdaŭraj, penigaj, akraj kaj komplikaj klasbatalo kaj batalo inter la du linioj. La historio de la Komunista Partio

de Kamarado

Guofeng,

la Centra Komitato de

Ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro,

Granda Gvidanto kaj Instruisto

Maŭ Zedong

de Ĉinio ja estas historio de batalo inter la marksisma-leninisma linio de Prezidanto Maŭ kaj la oportunistaj linioj dekstraj kaj “maldekstraj” en la Partio. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, nia partio venkis la oportunistajn liniojn de Ĉen Duhiu, Kju Kiubaj, Li Lisan, Luo Ĝanglong, Vang Ming, Ĝang Guotaŭ, Gaŭ Gang kaj Ĵaŭ Ŝuŝi, kaj Peng Dehuaj, kaj krome en la Granda Proleta Kultura Revolucio venkis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ. Gvidate de la marksisma-leninisma linio de Prezidanto Maŭ, nia partio senĉese kreskis kaj fortiĝis, disvolviĝis de grupoj kun kelkdek komunistoj en la partion kun pli ol 30 milionoj da membroj kiu hodiaŭ gvidas la Ĉinan Popolan Respublikon, kaj en la partion bone disciplinitan, armitan per la teorio de Marksismo-Leninismo, aplikantan la metodon de memkritiko kaj strikte ligi-

ĝantan kun la popolamasoj, kaj fariĝis granda, glora kaj ĝusta marksisma-leninisma partio.

En la longdaŭraj revoluciaj militoj, Prezidanto Maŭ hardis kaj kulturis nian armeon. En tre frua tempo, Prezidanto Maŭ jam elmetis la faman tezon ke “**ei pafiloj venas ŝtatpotenco**”. Li persone gvidis la Aŭtunrikoltan Leviĝon, fondis la unuan trupon de laborista-kampana ruĝa armeo kaj starigis la unuan kampan revolucion bazlokon sur Gिंगgangmontaro. En la pasintaj 50 jaroj, gvidate de Prezidanto Maŭ, nia armeo frakasis la kontraŭrevoluciajn ĉirkaŭekstermojn fare de Kuomintango kontraŭ la revoluciaj bazlokoj, venke plenumis la mondfaman Longan Marŝon de 25,000 Lioj, venkis la japanan imperiismon kaj ekstermis 8 milionojn da armeanoj de Ĉiang Kajŝek armitajn de la usona imperiismo,



Kamarado Hua Guofeng faras funebran paroladon.

kaj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, venke kondukis la Militon por Rezisti kontraŭ Usona Agreso kaj Helpi Koreion, triumfe rebatis la armitajn provokojn kontraŭ nia lando fare de sovetunia reviziisma social-imperiismo kaj reakciularoj kaj defendis la sekurecon de la patrolando. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, sekvante instruon de Prezidanto Maŭ, nia armeo partoprenis en laboro por subteni industrion, agrikulturon kaj la vastajn amasojn de maldekstruloj, kaj en milita kontrolo kaj milita kaj politika trejnado kaj per tio faris novajn kontribuojn al la popolo. Prezidanto Maŭ ella-

boris por nia armeo marksisman-leninisman armeo-konstruan linion kaj strategion kaj taktikojn de popola milito, kaj tio estas la fundamenta kaŭzo ke nia armeo povis disvolviĝi de malgranda en granda kaj de malforta en fortan, disvolviĝi en potencajn armitajn fortojn kun kampa armeo, loka armeo kaj vasta milicio en kombino, kaj fariĝi firma kolono de la diktaturo de la proletaro. Antaŭ la popolaj armitaj fortoj, armitaj per Maŭzedongpenso, ĉiu ajn malamiko, kiu aŭdacos entrudiĝi, certe estos dronigita en la vasta oceano de popola milito.

Laŭ la universala vero de Marksismo-Leninismo kaj kombinante ĝin kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio, Prezidanto Maŭ Zedong ĝuste solvis serion da fundamentaj problemoj, nome kaptado de ŝtatpotenco per armitaj fortoj, firmigo de la diktaturo de la proletaro kaj prevento de kapitalisma restaŭro en nia lando.

Dum la periodo de la nov-demokratia revolucio, Prezidanto Maŭ analizis la historion kaj la ekzistantajn kondiĉojn en Ĉinio, analizis la ĉefan kontraŭdiron en la ĉina socio, ĝuste respondis la demandojn pri la objektoj, taskoj, movfortoj, karaktero, perspektivoj kaj transformiĝo de la nov-demokratia revolucio en Ĉinio kaj difinis, ke la nov-demokratia revolucio kontraŭ imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo fare de la vastaj popolamasoj sub la gvido de la proletaro estas la ĝenerala linio kaj ĝenerala politiko de nia partio en tiu ĉi historia periodo. Prezidanto Maŭ montris, ke por kapti la ŝtatpotencon per armitaj fortoj, nia lando povas iri nur la vojon starigi kamparajn bazlokojn, sieĝi la urbojn per la kamparo kaj fine kapti la urbojn, sed ne alian vojon. Resuminte la historion sperton de nia partio, Prezidanto Maŭ montris, ke komunista partio fondita laŭ la revolucia teorio kaj revolucia stilo de Marksismo-Leninismo, armeo gvidata de tia partio kaj unueca fronto de ĉiuj revoluciaj klasoj kaj ĉiuj revoluciaj grupoj sub la gvido de tia partio estas la tri ĉefaj magiaj armiloj, per kiuj la Komunista Partio de Ĉinio venkis la malamikojn en la ĉina revolucio. Dank' al tiuj tri magiaj armiloj Prezidanto Maŭ gvidis nian partion en gajno de la granda venko de la nov-demokratia

revolucio kaj fondo de la Ĉina Popola Respubliko. La venko de la revolucio de la ĉina popolo sub la gvido de Prezidanto Maŭ ŝanĝis la situacion en la Oriento kaj en la mondo kaj malfermis novan vojon por la liberiga afero de la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj.

En la nova historia periodo de la socialisma revolucio kaj la diktaturo de la proletaro de nia lando, Prezidanto Maŭ resumis la pozitivan kaj negativan sperton de la internacia komunisma movado, aplikante la teorion de Marksismo-Leninismo pri la unueco de kontraŭstaroj, penetrive analizis la klasajn rilatojn en la socialisma socio kaj montris, ke la ĉefa kontraŭdiro en la socialisma socio estas la kontraŭdiro inter la proletaro kaj la burĝaro. En la historio de la disvolviĝo de Marksismo, Prezidanto Maŭ unuafoje montris eksplicite, ke post la fundamenta plenumo de la socialisma transformo de la posedanteco de produktaj rimedoj, ankoraŭ ekzistas klasoj kaj klasbatalo, elmetis la tezon, ke en la socialisma socio ekzistas du specoj de kontraŭdiroj malsamaj en naturo, nome la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo, kaj elmetis la grandan teorion de daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Prezidanto Maŭ ripetade admonis la tutan partion, la tutan armeon kaj la tutlandan popolon **“Nepre ne forgesu la klasbatalon”**, montris, ke la socialisma socio kovras sufiĉe longan historian periodon, en tiu historia periodo ĉiam ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo, ekzistas la batalo inter la du vojoj socialisma kaj kapitalisma, ekzistas la danĝero de kapitalisma restaŭro kaj ekzistas la minaco de ŝtatrenverso kaj agreso fare de imperiismo kaj social-imperiismo, kaj

ellaboris por nia partio la fundamentan linion por la tuta historia periodo de socialismo. Laŭ la ŝanĝiĝoj de klasaj rilatoj kaj la karakterizaĵoj de la klasbatalo en la socialisma periodo, Prezidanto Maŭ faris la sciencan tezon: **“Konduki socialisman revolucion kaj tamen ne scii, kie estas la burĝaro. Ĝi ĝuste estas interne de la komunista partio, nome la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ili ankoraŭ iras tiun vojon.”** Reprezentante la interesojn kaj deziron de la laborista klaso, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pri daŭrigo de la revolucio, Prezidanto Maŭ persone iniciatis kaj gvidis la Grandan Proletan Kulturalan Revolucion, kiu frakasis la restaŭrajn konspirojn de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, kritikis ilian kontraŭ-revolucian reviziisman linion, deprenis la de ili uzurpitan parton de gvidanteco de la Partio kaj la ŝtato kaj garantiis al nia lando venkan antaŭenmarŝon laŭ la marksisma-leninisma vojo. La senĉesa venkado super ŝtatrenverso kaj subfosado fare de imperiismo, reviziismo kaj reakciularo, persistado en socialismo kaj firmigado de la diktaturo de la proletaro en la Ĉina Popola Respubliko kun vasta teritorio kaj multnombra loĝantaro estas granda kontribuo kun monda historia signifo farita de Prezidanto Maŭ Zedong por la nuna epoko, kaj samtempe ĝi liveris freŝan sperton al la internacia komunisma movado por opono kontraŭ kaj prevento de reviziismo, firmigo de la diktaturo de la proletaro, prevento de kapitalisma restaŭro kaj konstruado de socialismo.

Prezidanto Maŭ Zedong estas la plej granda marksisto de la nuna epoko. Kun la granda braveco de proleta revolu-

ciisto, Prezidanto Maŭ iniciatis en la internacia komunisma movado la grandan batalon de kritiko kontraŭ la moderna reviziismo kun la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la centro, kaj tio plivigligis la disvolviĝon de la proleta revolucia afero en la mondo kaj la afero de la popoloj de ĉiuj landoj oponi kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo kaj puŝis antaŭen la historion de la homaro. Laŭ la principo kombini la universalan veron de Marksismo-Leninismo kun la konkreta praktiko de la revolucio, Prezidanto Maŭ resumis la sperton de la revoluciaj bataloj enlandaj kaj internaciaj, en ĉiuj flankoj heredis, defendis kaj disvolvis Marksismon-Leninismon kaj riĉigis la teorion trezorejon de Marksismo. Maŭzedongpenso estas potenca ideologia armilo por oponi kontraŭ la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluatantaj klasoj kaj por oponi kontraŭ imperiismo, social-imperiismo kaj diverslandaj reakciularoj. **La ĝusteco aŭ malĝusteco de la linio ideologia kaj politika decidus ĉion.** Ĉiuj venkoj de la ĉina popolo estas grandaj venkoj de Maŭzedongpenso. La brilo de Maŭzedongpenso prilumos eterne por la ĉina popolo la antaŭenmarŝan vojon.

Prezidanto Maŭ Zedong estas brila ekzemplo de tutkora laborado por la interesoj de la ĉina popolo kaj la aliaj popoloj de la mondo. Prezidanto Maŭ dediĉis sian tutan energion de la vivo ĝis la lasta spiro al la liberiga afero de la ĉina popolo, al la liberiga afero de la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo kaj al la afero de komunismo. En la historio de la proleta revolucia movado tre malofta estis tia granda proleta revoluciisto, kia Prezidanto Maŭ, kiu spertis diversajn revolu-

ciajn ŝtormojn, venkis diversajn danĝerojn kaj malfacilojn, ĉiam ligiĝis koron kun koro kun la laboristoj, kamparanoj kaj aliaj laborantaj amasoj, staris ĉe la fronto de la revoluciaj movadoj kaj gvidis ilin en antaŭenmarŝado. La grandiozaj kontribuoj faritaj de Prezidanto Maŭ en revolucia teorio kaj revolucia praktikado vivos eterne. Nun Prezidanto Maŭ forpasis. Tio estas netaksebla perdo por nia partio, nia armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando, por la internacia proletaro kaj ĉiuj revoluciaj popoloj kaj por la internacia komunisma movado.

La tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando nepre devas aktive respondi al la alvoko de la Centra Komitato de la Partio, turni la malĝojon en forton, daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, **“praktiki Marksismon, kaj ne reviziismon; unuiĝi, kaj ne splitiĝi; esti malkaŝema kaj honesta, kaj ne fari konspirojn kaj intrigojn”**, kaj sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio konduki ĝis la fino la proletan revolucionan aferon de nia lando komencitan de Prezidanto Maŭ.

Enlande, ni nepre devas serioze studi Marksismon - Leninismon - Maŭzedongpenson, preni la klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, persisti en la fundamenta linio kaj politikoj de la Partio por la tuta historia periodo de socialismo, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, firmigi la grandan unuiĝon de la popolo de ĉiuj naciecoj gvidatan de la laborista klaso kaj bazitan sur la alianco de laboristoj kaj kamparanoj, firmigi kaj disvolvi la venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio, oponi kontraŭ reviziismo kaj preventi ĝin,

firmigi la diktaturon de la proletaro, laŭ la principo de sendependeco kaj memdecido kaj sinapogo sur propraj fortoj pene konstrui nian landon en potencon socialisman landon kaj klopodi por fari relative grandan kontribuon al la homaro. Ni nepre plenumos la sanktan aferon liberigi Tajvan por reunuigi la patrolandon.

En la internacia sfero, ni nepre devas daŭre rezolute plenumi la revoluciajn diplomaciajn liniojn kaj politikojn de Prezidanto Maŭ, persisti en la proleta internaciismo kaj neniam ĉasi hegemonion. Ni devas fortigi nian unuiĝon kun la internacia proletaro, la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo, fortigi nian unuiĝon kun la popoloj de la tria mondo, fortigi nian unuiĝon kun ĉiuj landoj, kiuj suferas de agreso, ŝtatrenverso, interveno, superrego kaj tiranado fare de imperiismo kaj social-imperiismo kaj formi plej vastan unuecan fronton por oponi kontraŭ imperiismo, precipe kontraŭ hegemoniismo de la du superpotencoj Sovetunio kaj Usono. Ni devas unuiĝi kun ĉiuj veraj marksismaj-leninismaj partioj kaj organizoj de la tuta mondo kaj kune kun ili batali por elimini sur la terglobo la sistemon de ekspluatado de homo al homo, realigi komunismon kaj liberigi la tutan homaron.

Prezidanto Maŭ Zedong vivos eterne en nia koro!

Vivu la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!

Eternan gloron al la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong!

LA GRANDA GVIDANTO PREZIDANTO


Prezidanto Maŭ en norda Senhi, 1936



MAŬ VIVOS ETERNE EN NIA KORO

Kamarado Maŭ Zedong faris paroladon en la kongreso de la okguberniaj malriĉkamparanaj organizoj en la revolucia bazo de Gianghi, en 1933.







De maldekstre:

Kamarado Maŭ Zedong en juneco

Kamarado Maŭ Zedong en Ĉangŝa, 1919

Kamarado Maŭ Zedong en Ŝanhajo, 1924



De maldekstre:

Kamarado Maŭ Zedong en Kantoŭo, 1925

Kamarado Maŭ Zedong en Vuhan, 1927

Kamarado Maŭ Zedong en Jujin de Gianghi, 1931



Prezidanto Maŭ kaj Kamarado Ĝoŭ Enlaj




Prezidanto Maŭ kaj Kamarado Hua Guofeng



Prezidanto Maŭ kaj Kama-
rado Ĝu De



Prezidanto Maŭ kaj Kama-
rado Kang Ŝeng





Prezidanto Maŭ kaj Kamarado Dong Bivu

Prezidanto Maŭ kaj Kamarado Je Gianjing






Prezidanto Maŭ en verkado de la brila artikolo «Pri Longdaŭra Milito», en kaverndomo de Jan-an, 1938



Prezidanto Maŭ faris raporton «Pri Longdaŭra Milito» en la Ĉina Popola Kontraŭjapana Milita kaj Politika Kolegio de Jan-an en majo de 1938.





Prezidanto Maŭ intime interparolis kun kamparanoj de Janggialing en Jan-an, en 1939.

Prezidanto Maŭ faris raporton en la Arta kaj Literatura Kolegio Lusin de Jan-an, en majo de 1938.



Prezidanto Maŭ intime interparolis kun knaboj-soldatoj de la Okavoja Armeo en Jan-an, en 1939.



Prezidanto Maŭ faris paroladon en la memoriga kunveno por la 3-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Kontraŭjapana Milita kaj Politika Kolegio en Jan-an, en 1939.

Prezidanto Maŭ kun la partoprenantoj de la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an, en majo de 1942.







Prezidanto Maŭ faris paroladon en la kunveno okazigita de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio por akcepti labormodelojn de la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Lim-regiono, en 1943.

Prezidanto Maŭ faris en Jan-an raporton al kadroj en 1942.



Prezidanto Maŭ en Jan-an, 1944

Prezidanto Maŭ faris politikan raporton en la Sepa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, en 1945.





Por efektivigi la principon paco konstrui Ĉinion Prezidanto Maŭ persone veturis al Ĉongking por intertrakti kun Kuomintango, post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilite en aŭgusto de 1945.

Prezidanto Maŭ laboris en kaverndomo de Zaŭjuan en Jan-an, en 1946.





Prezidanto Maŭ pririgardis militan mapon en norda Ŝenhi por direkti la grandan Popolan Liberigan Militon, en 1947.




Prezidanto Maŭ en manovrado en norda Ŝenhi, 1947.



Prezidanto Maŭ faris gravan raporton kun granda historia signifo en la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, en 1949.






Prezidanto Maŭ revuis, en Hijuan de Pekino, tankan trupon de ĈPLA, en 1949.



Prezidanto Maŭ legis informon pri la liberigo de Nankino, en 1949.



Prezidanto Maŭ estis elektita de la Unua Plena Sesio de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kiel prezidanto de la Centra Popola Registaro de la Ĉina Popola Respubliko, en septembro, 1949.






Prezidanto Maŭ prezidis la duan kunsidon de la Unua Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kiu diskutis kaj pasigis la projekton de la nacia emblemo de la Ĉina Popola Respubliko, en 1950.

Prezidanto Maŭ solene proklamis, sur Tian-anmenpordego, la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko, en la 1-a de oktobro, 1949.




Prezidanto Mañ en inspektado
al la Flava Rivero, 1952





Prezidanto Maŭ balotis por elekti popolajn reprezentantojn, en 1953.

Prezidanto Maŭ en la tutlanda kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, 1955



Prezidanto Maŭ persone reviziis la unuan socialisman konstitucion de nia lando «La Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko» (projekto), en 1954.





Prezidanto Maŭ aŭdiencis reprezentantojn de la Junulara Ligo en Pekino, en 1957.

Prezidanto Maŭ faris, en la 11-a Sesio (plivastigita) de la Plej Alta Ŝtata Konferenco, ekstreme gravan paroladon «Pri Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo», en 1957.







Prezidanto Maŭ faris gravan paroladon en la Dua Sesio de la Oka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, en 1958.

Prezidanto Maŭ legis dazibaŭojn en iu trupo de ĈPLA, en 1958.



Prezidanto Maŭ inspektis fabrikon de Anhuj-provinco, en 1958.



Prezidanto Maŭ intime interparolis kun afinaciaj laboristoj dum sia inspektado de fabriko en Anhuj-provinco, en 1959.



Prezidanto Maŭ inspektis kamparon de Henan-provinco, en 1958.



Prezidanto Ma ō intime interparolis kun malriĉkamaranoj-komunumanoj en sia hejmloko Ŝaŭŝan, en 1959.



Prezidanto Maŭ inspektis iun trupon de la mararmeo de ĈPLA, en 1953.




Prezidanto Maŭ interparolis kun soldatoj de kuirista subplotono de iu trupo de ĈPLA, en 1958.



Prezidanto Maŭ aŭdiencis komandantojn kaj batalantojn de iu trupo de la aerarmeo de ĈPLA, en 1964.

Prezidanto Maŭ inter la instruistoj kaj lernantoj de Ŝaŭŝan-lernejo, 1959





Prezidanto Maŭ intime manpremis kun uigura malriĉkamparano Kurban Tulum de Hingiang, en 1958.



Prezidanto Mañ laboris en la konstruejo de la Akvokonservejo de la Dek Tri Maŭzoleoj, en 1958.




Prezidanto Maŭ en la Mitingo de Ĉefurbaj Diversrondaj Popolanoj por Subteni la Vjetnaman Popolon en Ĝia Kontraŭusona kaj Nacisava Batalo, 1965

Prezidanto Maŭ inter geamikoj el Azio, Afriko kaj Latinameriko, 1959



Prezidanto Maŭ aŭdiencis, post rigardo de la moderna revolucia pekinopero «Sagaca Kapto de la Tigra Monto», la tutan aktoraron, en 1967.



Prezidanto Maŭ sur Luŝan-monto, 1961





Prezidanto Maŭ en la Deko Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, 1962




Prezidanto Maŭ sur Ginggang-monto, 1965




Prezidanto Maŭ en la Dekunua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, 1966

Prezidanto Maŭ unuafoje revuis, sur Tian-anmenpordego, la armeon de la Granda Proleta Kultura Revolucio, en la 18-a de aŭgusto, 1966.





Prezidanto Maŭ en jipo
revuis ruĝgardianojn ve-
nintajn el diversaj lokoj de
nia lando, en 1966.






Prezidanto Maŭ parolis en la Dekdua Plena Sesio (plivastigita) de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, en 1968.



Prezidanto Maŭ faris gravan paroladon en la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, en 1969.



Prezidanto Maŭ faris solenan deklaron "Popoloj de la Tuta Mondo, Unuiĝu kaj Venku la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Hiajn Lakcojn!", en la 20-a de majo, 1970.




Prezidanto Maŭ en la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, 1970




Prezidanto Maŭ en Pekino, 1972



Prezidanto Maŭ en la Deka Tutlanda Kongreso
de la Komunista Partio de Ĉinio, 1973





Prezidanto Maŭ kontribuis la tutan energion de sia tuta vivo al la liberiga afero de la ĉina popolo, al la liberiga afero de la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo kaj al la komunisma afero. Prezidanto Maŭ vivos eterne en nia koro.

Decido pri starigo la granda gvidanto Prezidanto

fare de la Centra Komitato de la Komunistoj
de la Tutlanda Popola Kongreso de
Konsilantaro de la Ĉina Popola
de la Centra Komitato

(la okan d

Por eterne memorigi Prezidanton Maŭ Zedong, la grandan gvidanton de nia partio, nia armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando, kaj grandan instruiston de la internacia proletaro kaj la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj, eduki kaj kuraĝigi laboristojn, kamparanojn, soldatojn kaj aliajn laborulojn daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, persisti en Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj

de memorhalo de kaj instruisto Maŭ Zedong

Partio de Ĉinio, la Konstanta Komitato
de la Ĉina Popola Respubliko, la Ŝtata
Respubliko kaj la Milita Komisiono
de la Komunista Partio de Ĉinio

(oktobro, 1976)

konduki ĝisfine la proletan revolucion aferon, ni decidis:

1. Starigi en la ĉefurbo Pekino memorhalon por la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong.
2. Post la finkonstruiĝo de la memorhalo, transloki en ĝin la kristalan ĉerkon en kiu kuŝas la korpo de la forpasinta Prezidanto Maŭ Zedong, por ke la vastaj popolamasoj povu esprimi sian respekton al li.

Decido de la Centra Komunista Partio de la «Elektitaj Verkoj» preparado de la «Verkaro»

En la lasta pli ol duona jarcento, laŭ la principo de kombino de la universala vero de Marksismo-Leninismo kun la konkreta praktiko de revolucio, en gvidado de la granda batalo de nia lando por plenumi la nov-demokratian revolucion kaj konduki la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon, en la granda batalo kontraŭ dekstraj kaj “maldekstraj” oportunistaj linioj interne de la Partio, en la granda batalo kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kun la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la centro kaj diverslandaj reakciularoj, la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong en ĉiuj flankoj heredis, defendis kaj disvolvis Marksismon-Leninismon kaj riĉigis la teorion trezorejon de Marksismo. La verkoj de Prezidanto Maŭ estas senmortaj dokumentoj de Marksismo-Leninismo. La eldono de verkoj de Prezidanto Maŭ havas grandan

aktualan signifon kaj profundan historian signifon por la popolo de ĉiuj nacioj de nia lando en daŭrigo de la afero postlasita de Prezidanto Maŭ kaj ĝisfina konduko de la proleta revolucia afero kaj por la liberiga afero de la tutmondaj proletaro kaj subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj. Tio estos granda evento en la disvolva historio de Marksismo, kaj ni nepre devas klopodi serioze kaj energie kaj bone ĝin fari. La Centra Komitato de KPCĉ decidas:

1. Kiel eble plej rapide eldoni la kvinan volumon de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» kaj plue eldoni la ceterajn volumojn. Samtempe kun la eldono de la elektitaj verkoj, aktive prepari eldonon de la «Verkaro de Maŭ Zedong».

2. La eldonado de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» kaj la «Verkaro de

Komitato de la de Ĉinio pri eldono de Maŭ Zedong» kaj de eldono de Maŭ Zedong»

Maŭ Zedong» estos rekte gvidata de la Politika Buroo de CK de KPCĈ estrata de Kamarado Hua Guofeng, sub kiu estos establita Komisiono pri Redaktado kaj Eldonado de la Verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong, kiu respondecos pri la konkretaj laboroj de ordigado, redaktado kaj eldonado.

3. Ĉiuj manuskriptoj de la verkoj de Prezidanto Maŭ estos kolektataj kaj konservataj de la Kancelario de CK de KPCĈ.

La Centra Komitato de la Partio ordonas, ke la partiaj komitatoj de ĉiuj niveloj devas kiel eble plej rapide sendi al la Kancelario de CK de KPCĈ ĉiujn manuskriptojn de Prezidanto Maŭ, inkluzive originalajn skribaĵojn de artikoloj, dokumentoj, telegramoj, skribitaj direktivoj, leteroj, poemoj kaj epigrafoj, kaj primaraj notoj de paroladoj, konservatajn en iliaj respektivaj regionoj kaj respektivaj

unuoj. La Kancelario de CK de KPCĈ devas fari kopiojn kaj doni ilin al la unuoj aŭ personoj, liverintaj la originalojn, por konservi.

La Centra Komitato de KPCĈ alvokas al la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando, ke ili levu novan altan tajdon de studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkoj de Prezidanto Maŭ kaj energie helpu en kolektado de la originaloj de skribaĵoj de Prezidanto Maŭ. La Centra Komitato de KPCĈ esperas, ke la marksismaj-leninismaj partioj kaj organizoj, progresemaĵoj grupoj kaj amikaj personoj de ĉiuj landoj donos helpon en kolektado de la originalaj skribaĵoj de verkoj de Prezidanto Maŭ.

La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

La okan de oktobro, 1976

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian

P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong (portreto)	1
Mesaĝo al la Tuta Partio, la Tuta Armeo kaj la Popolo de Ĉiuj Naciecoj de la Tuta Lando fare de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Milita komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio	2
La restaĵoj de la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ (foto)	8
Funebra soleno en Pekino por esprimi respekton al la restaĵoj de Prezidanto Maŭ	14
Pekino kaj aliaj lokoj de Ĉinio okazigis solenajn funebrajn kunvenojn por Prezidanto Maŭ	20
Funebra Parolado de Kamarado Hua Guofeng, Unua Vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, en la Funebra Kunveno por la Granda Gvidanto kaj Instruisto Prezidanto Maŭ Zedong	26
La granda gvidanto Prezidanto Maŭ vivos eterne en nia koro (fotoj)	32
Decido pri starigo de memorhalo de la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong fare de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio	96
Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri eldono de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» kaj preparado de eldono de la «Verkaro de Maŭ Zedong»	98

Sur la kovrilo:

Plej profunda funebrado pri la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong

Sur la dorskovrilo:

Miliono da popolanoj de nia ĉefurbo solene okazigis funebran kunvenon por funebri kun plej granda malĝojo pri la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ.

Montregiono antaŭe malriĉa nun abunda je fiŝoj kaj rizo



Huangŝi-akvorezervejo en la supra baseno de Bajjang-rivero

Taŭjuan-gubernio de Hunan-provinco estas loko kun montetoj. Antaŭ la Liberiĝo la irigacia kondiĉo de tiu loko estis malbona kaj ofte okazis trosekeco. Bajjang-rivero, kiu trafluas ĝin, tiam ne nur ne estis utiligata, male ofte damaĝis la tutan gubernion per inundo.


Post la Liberiĝo, la popolo de la gubernio suriris la vojon de kooperigo kaj popol-komunumigo. Per sia kolektiva ekonomia forto ĝi faris akvoutiligan konstruadon, bonigis la produktajn kondiĉojn kaj komencis kulturiri rizon dufoje en ĉiu jaro anstataŭ unufoje. Dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio, la popolo de la gubernio pli vigliĝis kaj pli entuziasmiĝis. En la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, sub la gvido de la gubernia komitato de KPC ĝi kritikis kapitalismon kaj reviziismon, levis altan tajdon de fundamenta agrara konstruado kaj faris multflankan utiligon de Bajjang-rivero. Nun sur tiu rivero kaj ĝiaj branĉoj jam konstruiĝis dekoj da grandaj, mezaj kaj malgrandaj akvorezervejoj, pumpstacioj kaj hidroelektrejoj kun totala kapacito de pli ol 7.800 kilovatoj, dank' al kio la 28.667 hektaroj da kampoj en ĝia baseno fariĝis kampoj kun stabila alta produktokvanto. La mez-nombra hektara produktokvanto de greno antaŭ la Liberiĝo estis nur 2.250 kg., sed tiu de la nuno estas pli ol 7.500 kg. Krome oni ankaŭ disvolvis la surakvan trafikon kaj ekspluatis 13.000 hektarojn da kalvaj montoj de tiu baseno. Dank' al produkto de elektro, fondiĝis tie konsiderinda nombro da malgrandaj fabrikoj servantaj al agrikultura produktado. La montregiono antaŭe malriĉa, nun jam fariĝis abunda je fiŝoj kaj rizo.



Congjang-pumpstacio en nokto


Hidroelektrejo de Jankjuan-rivera Baraĵo






En la elektrejo

Baraĵo de Lilin-rivero





Gvidantaj kadroj de la gubernia komitato de KPC estas en planado pri ekspluatado de Bajjang-rivero.



Post labo





Irigacia kanaletto




Barajo de Gujuan-rivero





Malriĉ kamparanino rakontas pri mizera pasinteco.

Post konstruado de barajo, altiĝis la akvonivelo kaj pliboniĝis la navigaj kondiĉoj



Laboristoj sur la konstruejo de barajo sur Giuhi-rivero






Transplantado de rizplandidoj

Juna laboristino sur konstruejo



Gvidanto de hidroelektrajo estas ankaŭ ordinara laborulo.





Dizeloj produktitaj de la gubernia fabriko de agrikulturaj maŝinoj

**DAŬRIGU LA AFERON
POSTLASITAN DE
PREZIDANTO MAŬ
KAJ KONDUKU LA
PROLETAN REVOLUCIAN
AFERON ĜIS LA FINO!**



世界语《中国报道》一九七六年第十一、十二期（本刊代号：二——九一五）

